Por starigi tian laborcentron ni kompreneble bezonas subtenon kaj por povition mi kun konsento de mia ĉefo alvenis ĉi-foje en Svedlandon. Post kelkmonata laboro mi nun kun ĝojo povas konstati, ke la instituto de Tagore jam invitis svedan slojdinstruistinon, kiu speciala nin helpas kaj en la organizo kaj en instruado de virinaj manlaboroj. Por bone helpi en tiu laboro, ĉi tie en Stokholmo formiĝis komitato. Ni nun bezonas diversajn materialojn kaj necesajn ilojn kiujn ni intencas aĉeti en Svedlando kaj sendi kune kun la instruistino. Mi estos tre tre danka, se iuj povantaj ge-esperantistoj ankaŭ volus helpi al organizo de tiu grava afero per mondonaco. Helpemaj gesamideanoj kiuj eventuale volas plurajn informojn aŭ sendi mondonacon, bonvolu komuniki al la estro de nia komitato nome:

Grevinnan K. Hamilton  
Floragatan 2, Stokholmo.

Ĉiaspeca helpo aŭ donaco estos danke akceptata de la instituto. *L. Sinha.*

## SVEDA KRONIKO

**INSJÖN, LEKSAND kaj RÄTTVIK:**  
17.4 s-ro Tiberio Morariu alvenis al ĉirkaŭaĵo de Siljan por interesi la loĝantojn al Esperanto. En cititaj lokoj li faris intereseĝajn prelegojn pri Rumanio, kaj post la prelegoj li komencis ĉe-kursojn en nia praktika mondlingvo.

10.6 ĉirkaŭ la duono da kurspartoprenantoj de supre cititaj lokoj kunvenis en Leksand al kursfina festo. Ĝi estis farita tre rave per gajega instruado kaj

vestitaj per paroĥa vesto de Rättvik.  
*Kurspartoprenanto.*

**MALMÖ.** La diversaj sekcioj de la kongresa komitato laboras energie kaj celkonscie por fari la antaŭkongreson inda enkonduko al la verda semajno en Stockholm. Por sudsvedoj, kiuj ne povos ĉeesti la XXVI-an, la antaŭkongreso iĝos bona rekompenco. Laŭ jam faritaj aliĝoj la kongreso promesas iĝi vere internacia. Okaze de l' kongreso aperos belaspekta, esperanta gvidlibro pri Malmö kaj Lund.

17.7 Klubo Esperantista de Malmö havis ekskurson al Björnstorp kun promenado al Romeleklint. Multnombra



*La kursfina festo en Leksand.*

per paroladoj de la kurspartoprenantoj.

Vi novaj esperantistoj, ne forgesu vian lernajon. Aliĝu al esperantista klubo aŭ estiĝu klubo, ĉar per la komuna laboro kaj ekzerco vi lertiĝas kaj utilas al la Esperanto-movado.

— — —  
Ĉiuj paroĥoj de Dalekarlio estas konataj pro siaj pentrindaj vestoj. Konanto tre facile pro paroĥa vesto ekkonas paroĥanojn de diversaj lokoj. La komuna fotografajo montras partoprenantojn en la kursfina festo. Antaŭe en la mezo sidas gesinjoroj Morariu, s-ino M. estas vestata per la belega rumana nacia vesto. Maldekstre de ŝi sidas sinjorino vestita per la paroĥa vesto de Al, kaj pli maldekstre sidas du fraŭlinoj vestitaj per la paroĥa vesto de Leksand. La tri fraŭlinoj kaj unu sinjoro, kiuj sidas vice kaj dekstre de s-ro Morariu, estas

partopreno. Brila vetero. Ĝenerala kontenteco.  
*Partopreninto.*

**SLÖINGE.** Regule la esperanta klubo kunvenas ankaŭ somere. Antaŭ kelka semajno ĝi faris ekskurson kun malgranda tendaro en la bela loko Sjönevad. Super la tendareto la esperanta flago flirtis kaj estis kolektsigno por la ekskursantoj kaj atentigilo por la lokaj enloĝantoj kaj preterpasantoj. *Eiro.*

**ÖRNSKÖLDSVIK.** »La Agloŝildo» 8.6 havis la finfeston de la Czitrom-aj kursoj. En granda nombro kunvenis la kursanoj kaj la malnovaj esperantistoj. Bela programeto estis, parolado de la instruisto, muziko, kanto, ludoj ktp. Poste oni dankis la instruiston s-ron Tibor Czitrom kaj transdonis al li memordonacon.

*La Persono.*

## Malbona konduto.

De Hjalmar Söderberg.

Mi estas sola en mia sola ĉambro, kaj la lampo kantas. La fenestro estas malfermita pro la varma printempvespero, kaj de la strato aŭdiĝas kelkfoje voĉoj, sed neniuj vortoj. Mi sidas kun foto en la mano kaj kiel kelkfoje mi sidis ĝin fikse rigardante ĝis la vizaĝo fremdiĝis kaj mi ne plu povas kapti la animon malantaŭ la rigide ridetanta bildo. En ĉambro ie proksime, sube aŭ apude, iu muzikas per fortepiano — lernantino, kiu unufingraĉas.. Ŝajnas al mi, ke mi vidas malgrandan bubinon dekkvar- aŭ dek kvinjaran: ŝi elŝovas la buŝon kaj faras kiel bone ŝi kapablas kaj havas tro multe da laboro pri la notlegado, por pensi pri la belsono. Estis Reĝo dum unu tago: »Pri ŝia nomo kaj deven' mi ne okupis min ..»

Ho, kiel la tempo foriras! Kaj imagu, iam ekzistis tempo, kiam mi amis tiun belaĉan melodion de mia tuta, infaneca koro kaj ankaŭ la tutan teatraĵon. Estas pli ol dudek jaroj de tiam .. Kiel Zephoris ravis min per sia roza tenoro kaj siaj volupte tordemaj okuloj, kaj per siaj noblaj ideoj. »Kun forturnita vizaĝo mi metis mian dolĉan ŝarĝon sur la bordon .... Mi savis ŝian vivon: mi ankaŭ volis protekti ŝian modestecon ..» Kaj la malica princo Kadoro en sia verda nokta kostumo el pluŝo: »Nu, malestiminda monarĥo, dormu la dormon de la molanimeco: maldormas via malamiko!» Sed unuavice la belegan arion: »Pri ŝia nomo kaj deven'» .... Mi zumis kaj fajfis ĝin dum tutaj tagoj.

Iam ĝi aranĝis teruran malfeliĉon al mi.

Tiam mi estis dekdu jarojn aĝa kaj lernanto en la kvara klaso. Dum la printempo, tio okazis preskaŭ je la fino de la studsezono; mi sufiĉe bone sukcesis la tutan longan vintron kaj povis trankvile atendi la ekzamenon kaj la notojn — mi ĉiam transprenis ilin trankvile .. Estis leciono pri la gepatra lingvo, sen hejmtasko, nur legado de »la historio de Fritjof». Ĉie kvieto kaj paco, neniuj antaŭsentoj, ke danĝero minacas. Sed ĝi estis antaŭŝtorma kvieto. Mi legis la historion de Fritjof multajn fojojn antaŭe, kaj baldaŭ mi laciĝis sekvi la legadon. Kaj mi ne estis sola: la malatento estis sufiĉe ĝenerala, kaj oni amu-

zis sin per diversaj manieroj, ĉiuj malnovaj kaj eluzitaj. Flartabakujo iris de pupitro al pupitro, paperaĵoj flugis tra la aero, kaj lerte faldita »papermuŝo» iris laŭ bela kurblinio kaj trovis lokon fine sur la tablo de la instruisto. Eble ĝi estis destinita kiel facila aludo pri lia konata ameto al la glaso. Sed la instruisto estis konata pro sia kvietanimeco kaj mokata okaze pro sia mildeco kaj supersata pro amuzajoj kaj li ignoris la muŝon.

Sed subite okazis ege terura afero. Iu fajfis — fajfis, pure kaj belsone, meze de la leciono: »Pri ŝia nomo kaj deven'» ....

Mi apenaŭ rimarkis, ke tiu kiu fajfis estis mi, antaŭ ol mi interrompis min. Sed estis tro malfrue. Estis tute silente en la ĉambro, kaj mi vidis la plej malbonan fiknabon sin turni kaj preskaŭ admirante rigardi min. Mi komencis kompreni, ke mi faris ion, kio transiris ĉiujn limojn.

La vizaĝo de la instruisto estis ruĝega. Mi estis unu el la plej ĝentilaj knaboj kaj apartenis al liaj favoratoj. Tio pli grandigis la amarecon de la insulto, kiu lin suferigis.

— Vi — vi, li ĝemis, vi, bubaĉo! Kion vi faras? Bubo!

Ŝajnis al mi, ke ĉio dancis ĉirkaŭ mi. Sed mi pensis, ke mi devis respondi ion, provi doni klarigon. Kaj fine mi balbutis respondon, kiu enhavis la tutan veron kaj krome ĝi bedaŭrinde ne estis adaptebla al la intelekto de la instruisto.

Mi diris:

— Mi forrevis ....

Mi kredis, ke li ricevos apopleksion. Lia vizaĝo ege bluiĝis. Li kaptadis la spiron.

— Eliru! li kriis, eliru! Neniam en mia vivo mi aŭdis tian arogadon! For! Kustos, notu mallaŭdon por ŝi pro malbonkonduto! Eliru!

Mallumiĝis antaŭ miaj okuloj. Mi malfermis kaj fermis la pardonon tiel malrapide, kiel mi povis kaj eltrojis.

Mi iris al la akvokondukilo kaj trinkis akvon. Ĝi estis varma kaj malfreŝa kaj naŭzis min. Mi elprenis mian naztukon kaj restis apud la akvokondukilo, kaj intencis ŝajnigi, ke mi havas sangantan nazon, se Snuffe, la rektoro, venus en la koridoro.

Kio okazis al mi estis io terura. La plej granda malfeliĉo, kiu ĝis tiam renkontis min. »Malbonkonduto» estis teru-

ra. Kion patro diros .... Mi memoris kiel li koleriĝis kiam mi la unuan fojon hejmenvenis kun mallaŭdo, kaj ĝi tamen nur estis pro malordemo. Sed malbonkonduito! Ĝi kaŭzos pli malbonan kondutnoton, metigon inter la aĉulojn .. Laste mi serĉis kaj trovis specon da konsolo en penso, kiu jam kelkajn fojojn vizitis min, plej ofte dum malfacilaj momentoj. Mi pensis: ne estas realo, mi songas. »La vivo estas songo«. Tion mi ofte aŭdis de mia patrino. Kaj pri mi en tiuj momentoj ĝi estis tute vera. Mi pensis: mi ne povas certe scii ke io estas reala; ĉio, kion mi aŭdas kaj vidas kaj travivas certe povas esti songoj, kiujn mi songas .. Kaj la aliaj! La instruisto, la lernantoj. Al ili mi sekve estas songo .. Mi ĵus pruntis Shakespearen el la lerneja biblioteko kaj miaj lipoj flustris vortojn pri kiuj mi ne sciis kiel mondofamaj ili estas.

*El sama ŝtof', el kiu estas ni  
la songoj ankaŭ estas, longa dorm'  
ĉirkaŭas vivon, nin ....*

— Mi songas .. mi songas ..

Kustos malfermis la pordon de la klasĉambro:

— Vi devas enveni kaj legi, li diris.

Mi iris rigarde al la planko, al mia pupitro. Mia apuda kunlernanto montris al mi en la libro, kie ni estas: mi devis legi »la adiaŭon de Fritiof«.

Mi legis. Kaj ju pli multe mi legis des pli ŝajnis al mi, ke la sorto de Fritiof estis ankaŭ la mia. Li estis proskripciita kaj ekster la leĝo. Mi estis elpelita kaj starinta apud la akvokondukilo.

Mi venis al la lasta strofo:

*Ne iru al strand'  
Ring kun edzino  
kiam lumigas de steloj sablar'.  
Eble sur bordon  
estas ĵetitaj  
de Fritiof senpaca ostoj el mar'.*

Mi vidis mian propran kadavron ruli en la ondoj kaj ĵetiĝi sur la strandon, kaj sur la strando staris la instruisto kaj la tuta klaso, kaj la instruisto pentis, ke li donis malbonkonduiton al mi. Sed estis tro malfrue.

Mi kredas, ke estis en tiu momento ke mi unuafoje sentis la egan deziron esprimi suferon poezie. Mi apenaŭ povis diri la lastajn liniojn pro emocio, kaj kiam mi finis, mi ege ekploris.

— Jen, knabo, diris la instruisto, vi ne devas plori, ne! Iam mi estis tia bubo

## Argentaj harposonoj en la esperanto-boskoj.

Ne estas necese pruvi per multaj vortoj, ke nia epoko estas bedaŭrinde eksterordinara; al neniu el ni estas agrable aŭdi, kiel subpremas la perfortaj trombon-krioj la harposonojn, songitajn de Zamenhof; estas malgaje vidi, kiel kelkfoje oni forpuŝas la harpon, por anstataŭi ĝin per militpreta tamburo por akompani, aprobi la senpacienca trombon. — Ni veraj Esperantistoj havas nur unu rimedon por mildigi la malfeliĉon, kiu puŝis nin ĝuste en tiun ĉi mondon kaj por kontentigi nin: ni serĉu la harmonion *inter ni* kaj vidu en nia afero la eternan belon, kiu *tamen* estas survoje al tiu ĉi malfeliĉa generacio.

Baldaŭ ni solenos nian ĉiujaran feston, la nobla, genia spirito de nia mortinta Majstro denove ardigos nin pere de la plej misteraj ondoj de nia vivo kaj la sopiro por la senpolviĝo, senkotiĝo dum tiuj ĉi multpromesaj tagoj antaŭ la Stokholma kongreso devigas min por preni la plumon, por protesti kontraŭ io, kion *ni mem* faras kontraŭ ni, kio ne estas inda al ni, pro kio ni devos honti, kio estas danĝero de nia afero.

Mi firme kredas, ke temas nur pri devojiĝo kaj pro tio prefere mi ne citas nomojn, sed kun sincera peto mi turnas min al tiuj, kiuj per akraj sonoj ŝiras la harpokordojn en nia gazetaro; serĉu la harmonion! Ĉu estas iu, kiu trovas la tonon inda al ni mem, kiu diras pri alia, aŭ aliaj: »fuŝulo, fuŝfirmo«, kiu detruas, atakante moke la sole ekzistantan lingvan institucion, la Akademion; aŭ tiun alian, kiu jene parolas pri libro: ».. Se mi estus ano de .., mi protestus« .. kontraŭ tiu ĉi »trompo«. — Ĉu *trompo*, *fuŝfirmo*, *cerbogimnastikaj* malĝentilaĵoj donos provinc-vilaĝan sonon al nia gazetara instrumento? Ni ne esploru nun, kiu komencis tiun ĉi tonon, estas jam nun egale, ni adeptoj kaj legantoj deziras alian muzikon, harmonion kaj bonvolon por la intereso de tiu ideo, kies gardantoj ni estas kaj ni postulas, esperas la kunhelpon de ĉiu bonvola homo.

*Szilágyi.*

kiel vi. Se vi ĉesas plori vi evitas la malbonkonduiton!

Li kredis, ke pro la malbonkonduito mi ploris ..

Trad. *Signe Stenström.*

## De ĉie - pri ĉio - al ĉiu.

### ESPERANTO EN BRAZILO.

En Brazilo en 75 urboj 82 gazetoj komencis aperigi Esperantan kurson.

(*Heroldo de Esp.*, 10 jun.)

### ESPERANTO-KURSO KOMENCIGIS EN LA HISPANA RADIO.

La kurso okazas ĉiulunde kaj merkrede je la 17-a h. kaj duono.

(*Hispana Esp. Gazeto*, Junio.)

### NIA GAZETO

skribas pri Svenska Esp.-Tidningen: ... La gazeto montras al ni, kion povas fari esperantistoj, se ili bone kaj kapable laboras. Tre vigla vivo en ĉiuj grupoj kaj niaj svedaj amikoj preparas al ni belagan, koran kaj amikan akcepton. Ĉiu esperantisto devos tie troviĝi dum la kongreso. Se vi ne havas monon, prunteprenu ĝin en via urba banko .. (Junio.)

### LA KONFERENCO EN VIENO

havis grandan sukceson. Ĝi estas speciale rimarkinda pro la elstara oficialeco, per kiu ĝi estis preparita. De sveda parto partoprenis la konferencon lektoro Beckman (Karlskrona).

### LA INTERNACIA ESPERANTO MUZEO

(Vieno, Aŭstrujo, I. Neue Burg) petas mendon por la protokolaro de la konferenco, (ĉ. 80 paĝoj). Prezo 5 respondkuponoj. — La institucio eldonos adresaron de Esp.-rondoj kaj grupoj. Helpu kompletigi ĝin kaj mendu. (Prezo: antaŭ la fino de okt. 7 respondkuponoj.) — Oni petas sendi 30 liniajn artikolojn pri tio: »Kiel vi pensas pri Aŭstrujo, ties kulturlaboro kaj klopodoj venki la ekonomian krizon kaj havigi al sia loĝantaro feliĉan estonton.» La plej interesa respondo aperos. — S-ro Steiner, la prezidanto de la Muzeo petas poŝtmarkojn belajn. Li reciprokas.

(*Aŭstria Esperantisto*, Junio.)

### LA ORA JUBILEO DE LEO BELMONT.

Antaŭ kvindek jaroj aperis lia unua poemo en pola revuo. De tiam li estas eminenta verkisto kaj tradukisto en la pola kaj Esperanta lingvoj, senlaca batalanto por la libereco, vero kaj progreso. Inter aliaj li tradukis ĉiujn poeziaĵojn de nia Majstro en la polan lingvon.

— (Ankaŭ ni ripetas kun la »Pola Esperantisto»: Vivu longe kaj feliĉe!)

### LA NEDERLANDA POSTDIREKCIO POR ESPERANTO.

Tiuj P.T.T. geoficistoj, kiuj deziras partopreni la stokholman kongreson, ricevas por tiu celo ordinaran libertempon.

(*Praktiko*, Junio.)

### LA PLEJ GRAVA JURNALO DE HINDOĈINUJO

»La Patrie Annamite«, ĵus komencis Esp.-kurson.

(*Praktiko*, Junio.)

### S-ANO SINHA SKRIBAS PRI HAMAR EN LA ESPERANTOBLADET:

»Imagu! 500 esperantistoj, 10 procentoj de la tuta loĝantaro!«

### GREKAJ GELEARNANTOJ

de Esp. deziras korespondi. Leterojn sendu al »Lingvo Internacia«. Str. Rodon, Athénai, Grekujo.

### DU ANEKDOTOJ

el la ĵus aperinta anekdotlibro de Grenkamp-Kornfeld. (Ĉu vi aŭdis tion? Eld. Esp. Instituto, Venlo, Nederlando.)

1) — Johanjo, kiom da piedoj havas ĉevalo?

— Kvar, po unu je ĉiu angulo.

2) Iu sonorigas. Malfermas la servistino.

— Ĉu gesinjoroj estas hejme?

— Jes.

— Nu, do mi venos alian fojon.

Kompilis: *Fercil.*



### Ankoraŭfoje

ni mencias pri tio, ke dum la XXVI-a Kongreso la ĉefurba gazeto Dagens Nyheter ĉiutage enhavos tutan paĝon de varia teksto en Esperanto pri kaj ĉirkaŭ la kongreso. Jen unikaĵo por ĉiu!

### Skandinaviska Kredit A.-B.,

la plej granda stokholma banko, anoncis oficialan kurson por sia oficistaro. La ĵus komencitan kurson ĉ. 15 geoficistoj partoprenas. La kurso promesas tre bonajn rezultojn. Kursgvidanto: dr. Szilágyi.

### Ne malpli ol 25 esperantorondoj

kun entute 485 partoprenantoj laboris dum la sezono 1933—34 en Gotenburgo.

## Petseri —

### unu el la estonaj perloj.

Svedoj, kiuj estas vizitinta Estonion, plejparte konas nur la urbon Tallinn kaj ĝian ĉirkaŭaĵon. Povas esti, ke kelkaj el la turistoj scias ion pri la universitat-urbo, sed sendube neniu scias ion pri Petseri, la urbo kun sia mirinde bela monaĥejo.

Petseri troviĝas en suda Estonio, proksime al la rusa landlimo. Ĝi staras kiel posteno inter la okcidenta kaj orienta kulturoj. Pro tio la urbo mem ankaŭ havas duspecan aspekton. En la buŝo de la petserianoj la nomo de la malnova urbparto estas »Azio» kaj la alia, konstruita dum la nuna estona regado »Eŭropo». Estas granda diferenco inter la du urbpartoj. En »Azio» la domoj estas tre malgrandaj kaj malnovaj, konstruitaj laŭ rusa stilo kun kvarangulaj kortoj, limigitaj ĉiuflanke de multaj malnovaj konstruaĵoj kiel staloj, brut-ejoj kaj aliaj. Stratoj en tiu urbparto estas tre mallargaj, ne pavumitaj kaj sen trotuaroj kun herbo sovaĝe kreskanta. Ĉirkaŭ la domoj verdas ĝardenoj.

Tiu ĉi urbparto treege interesas al la turistoj. En azia parto troviĝas ankaŭ la fama malnova grek-katolika monaĥejo de Petseri. Ĉiu-jare miloj da eksterlandanoj veturas tien ĉi por vidi tiun tre interesan kaj ravan memoraĵon el mezepoko.

La monaĥejo estas fondita jam en la fino de la dekkvara jarcento. Tiam ĉasistoj en la loko de la nuna urbo en arb-aro aŭdis kanton kaj poste, en la jaro 1390, la terposedanto Dometjev trovis ĉe la bazo de la enirejon la monaĥon Markus. De post tiu tempo la famo de la grotoj en Petseri disvastiĝis malproksimen kaj grandaj aroj da pilgrimoj vizitis la monaĥejon. Nur en la dua duono de la XV-a jarcento la monaĥo Joonas komencis propramane konstrui la unuan preĝejon fosante ĝin en la monto.

La monaĥejo staras en profunda, sed mallarga valo de Kamenka, en bildbela loko. La unua preĝejo estas fosita en la monto, kiu ĉirkaŭas la valon. Poste dum multaj jarcentoj tiu groto, kiu pli frue estas nomita, estas largigita kaj nun ĝi havas sep irvojojn. La longeco de tiuj ĉi estas pli ol ducent metrojn. Nun la groto estas interesa tombejo. Tie estas enterigitaj pli ol 4000 kadav-

roj. Ili estas precipe de altrangaj monaĥoj, bojaroj, princoj kaj multe da militistoj, kiuj estas mortigitaj defendante la monaĥejon kontraŭ la malamikoj. Ĉiu tombo havas sian surskribon montrante al kiu ĝi apartenas. Estas tie ankaŭ troveblaj la malfermitaj tomboj, kiujn la vivantaj monaĥoj estas fosintaj por si mem. Ĉiu turisto nepre vizitas tiun ĉi interesan, subteran tombejon, ĉar ĝi vere estas vidinda.

Dum la jaroj 1558—1565 la monaĥejo estis ĉirkaŭata per alta kaj dika muro. De post tiu tempo ĝi ankaŭ fariĝis fortikaĵo. Ĝi devis defendi Rusujon kontraŭ Livlanda Ordeno. La muroj estas tre bone konservitaj ĝis la nuna tempo kaj la potenca mezepoka fortikaĵo rigardas renkonten al ĉiu vizitanto.

La monaĥejo mem estas tre granda kaj interesa muzeo. Ĉiu, kiu enpaŝas tra la pordego en monaĥejan korton, sentas, ke li estas elirinta el la nuna tempo kaj troviĝas en la mezepoko. Multe da belaj kaj kolorriĉaj preĝejoj, sonorilturoj kaj aliaj konstruaĵoj oni trovas tie.

La plej interesa preĝejo estas Pokrovski, ĉar ĝi estas fosita en monto tiamaniere, ke la monto mem estas unu el la preĝejmuroj. Maŝuma kaj mistika, kun 13 kolonoj kaj 8 kolonaroj, ĝi treege plaĉas al la vizitantoj. Antaŭ unu el la kolonoj troviĝas la loko kie preĝis la rusa caro Ivan la kruela 1570. Tie staras ankaŭ la seĝo, sur kiu li sidis dum la diservo.

Tre grava loko en la monaĥejo estas Risnitsa, kie oni gardas historiajn raraĵojn kaj valoraĵojn. Tie troviĝas inter alie du preĝtapiŝoj, kiuj la edzino de caro Ivan la kruela propramane pretigis kaj donacis al la monaĥejo. Ili kostas nun 340,000 estonajn kronojn.

Inter la monaĥejaj muroj staras entute sep preĝejoj, du antikvaj kaj originalaj sonorilturoj, multaj mallumaj monaĥĉieloj, vin- kaj kandeluzinoj kaj multaj aliaj necesaj domoj.

La nuna konsisto de monaĥejo estas: 1 episkopo, 1 igumeno, 10 pastro-monaĥoj, 5 monaĥoj kaj 17 junaj monaĥoj. Tre interesaj kaj mistikplenaj estas la diservoj de la monaĥoj, akompanataj de bela ĥorkanto.

El la ĉirkaŭaĵoj de Petseri estas Malnova Irboska, ĉe rusa landlimo, unu el la plej interesaj. Ĝi estas estadejo de la unua rusa princo Truvor, kiu en la jaro



## LIBROJ KAJ GAZETOJ

**ENCIKLOPEDIO DE ESPERANTO.** Vol. I. A—J. Redaktis L. Kókény kaj V. Bleier. La lingvo-fakon K. Kalocsay. Iniciatinto-ĉefredaktoro I. Sirjaev. Kunlaborantoj entute 107 konataj esperantistoj el ĉiuj tendencoj de la movado. Sur 272 dense presitaj tekstopaĝoj preskaŭ 1100 titolvortoj kaj sur 112 bildopaĝoj preskaŭ 300 bildoj. Formato 23×15 cm. Presita sur senligna papero. Prezo kun la baldaŭ aperonta dua volumo, kiu enhavos proksimume 350 teksto- kaj 160 bildopaĝojn, broŝ. svfr. 30.—, bind. svfr. 34.— plus 10 proc. por sendkostoj. Paguebla en du partoj. Eldonis Literatura Mondo, Budapest IX. Mester-u. 53, Hungarujo. La du volumoj kune estas la sama verko de la Asocio de Esperantistaj Libro-Amikoj por la jaro 1933. Novaj membroj de AELA en 1934 pagas por ĝi nur svfr. 14.— broŝ. kaj svfr. 16.— bindita kaj afrankita.

La apero de La Enciklopedio estas eksterordinare gratulinda okazaĵo de la esperantista vivo, kaj ni deziras tuj raportoj kaj atentigi nian legantaron pri la unika signifo de tiu ĉi verko, kiu estas preskaŭ vivbezonaĵo por ĉiuj seriozaj esperantistoj. Povas esti, ke la verko ne ĉiurilate estas kompleta, sed ni ne rajtas forgesi, kiel gigantan laboron signifis la kolektado de la datoj el la tuta mondo, kiel heroan persiston pretendis la sistemigo de la ricevitaj artikoloj kaj

862 venis el Svedujo. Malnova Irboska estas mezepoka fortikaĵo kun tri preĝejoj. Nuntempe ĝi estas vilaĝo. En la loka tombejo staras sur tombo de Truvor kalkŝtonplato. Ĉe Irboska estas ankaŭ la rusa landlimo kun ĝia dratbarilo videbla.

El aliaj pli interesaj lokoj estas Värnska, la norda bivakloko de la armeo kaj Vastseliina, la lasta orientflanka fortikaĵo de Livlanda ordeno kun ruinaĵo de iu kastelo.

Dum veturado en Petseri-provinco oni rimarkas multe da belaj montetoj, valetoj kaj aliaj belegaj lokoj.

Petseri la 31-an de majo 1934.

D-ro A. Nineman

Turistĉefo de Esperanto Klubo »Suno» en Petseri.

datoj; se ni pensas pri tio, ni povas nur kun la plej alta laŭdo pagi al la redaktantoj, kiuj donis al ni grandiozan verkon; kaj certe tiu ĉi verko en la sekvaj eldonoj estos perfekta dataro de nia movado. Kiam ni trafolumas la vastan volumon, ni sentas trankviliĝon, kvazaŭ ni alvenus el densa nebulo al la serena senlumo. La movado ĝis nun estis ia malluma, kiu per tiu libro kontroleble konkretiĝis, graviĝis. Ni bone povas taksii la signifon de la unua enciklopedio de nia movado, pri kiu prave diras la redaktantoj: »ĝi rakontas al ni pri suferado, batalado, penado de niaj unuaj pioniroj, pri luktoj, laciĝoj, . . . pri velkantaj folioj ktp. — La SAT-vortaro kaj tiu ĉi libro devas esti en ĉies biblioteko.

### Porinfana gazeto

estos eldonata el Holando. La 1:a numero aperos en julio. Oni petas pri kunlaboro precipe de instruistoj. Oni sin anoncu al *E. van Veenendaal-Bouwes, West-Grafdijk, Nederlando.*

**DANTE ALIGHIERI:** *Infero.* (Eld. Literatura Mondo. Trad. Kolomano Kalocsay. 282 p. Prezo: 8,80 sv. fr. broŝ.)

Ni devas konfesi, ke antaŭ nia artikoleto ni legis multe da recenzoj pri tiu ĉi libro kaj ni estis surprizitaj de tiu indiferenta aŭ eĉ malamika bagatelemo, per kiu granda parto de la Esperanta gazetaro akceptis tiun ĉi verkon: oni ja povas *sendepende* de tiu ĉi libro paroli pri la problemoj de la neologismoj, sed legante tiun ĉi majestatan verkon, tiun ĉi netuŝeble perfektan tradukon, oni devas nur miri, admiri kaj prisilenti aŭ prokrasti la bagatelojn de la ĉiutago. Bedaŭrinde ni povas elekti nur el du ebloj: aŭ tute mallonge skribi pri la libro, aŭ tro longe, — kaj la lasta solvo ne povas konveni al 16-paĝa gazeto, — do ni eĉ ne provas analizi la majstroverkon kaj ties majstran tradukon. Ni nur almetas, ke la tre bela libro estas ornamita de la same geniaj ilustraĵoj de D. Fáy kaj ni resumas nian juĝon en unu frazo: Tiu ĉi libro estas mejloŝtono kaj ni ne estu hipokritaj, uzante ties propagandvaloron eksteren, se ni ne donas al la verkisto la plene merititan honoron.

*Szilágyi.*

**GRENKAMP-KORNFELD-BRZEKOWSKI:** »*Pri l' moderna arto*» (Eld. Literatura Mondo, Budapest. 64 p. Prezo: broŝ. 7 sv. fr.)

La arto ĉiam serĉis kaj trovis novajn formojn kaj ĝuste pro tio oni dekfoje kontrolu en si la kondamnon pri kiu ajn tendenco, antaŭ ol eldiri ĝin. Mokitaj artaĵoj, mokitaj ideoj iĝis realaj kaj certe el la ideokirliĝo de la nova arto fine elformiĝos io, kion nia okulo ankorau ne povas diferencigi. La mezkultura laikulo ofte aŭdas pri diversaj »ismoj» kaj certe bezonas gvidilon, por alproksimigi tiujn tendencojn, en kiuj kaŝas sin tiu »io». La citita libro bonege servas por tiu celo. Klara lingvo faciligas la komprenon de la teoria parto. La plej granda parto de la bildoj havas demonstran celon, sed ili plejparte vere pretendas klariganton.

*Ĉu vi aŭdis tion?* (Kompilis S. Grenkamp-Kornfeld. Eld. Esperanto Instituto, Venlo, Nederlando. 40 p. Prezo: sv. kr. 1,50.

Lerte elektitaj anekdotoj, spritaĵoj. Tre bona legolibro. Szilágyi.

— ★ —

### Gesinjoroj Seppik

kiuj dum la pasinta jaro tiel energie kaj bonsukcese laboris en nia lando por Esperanto, intencas veni tien ĉi ankaŭ por la venonta vintro kaj volonte akceptas invitojn por kursoj kaj prelegoj («Estland, svenskminnenas land», «Estland i ord och bild», «Rysslands fönster mot Europa», ktp., kun belaj lum-bildoj kaj gramofonmuziko). Skribu al poŝtkesto 6, Tallinn, Estonio.

### Subteno al esperanto-rondoj.

Norda Ångermanlanda distrikto de I.O.G.T. decidis pri subteno de 10 kronoj al ĉiu esperantorondo de la distrikto kaj ankaŭ pri propono ĉe la »Grandloĝio» pri uzo de Esperanto ĉe internaciaj kunvenoj kaj korespondado.

### Världsfredens International (V. I.) Universala Pacifista Ligo (U. P. L.)

kongresos en *Stockholm en la parlamentejo* (kie kunvenos la mondkongreso de la esperantistoj)

la mardon 7-an de aŭg. je la 15-a h. por svedoj kaj svede parolantaj,

la vendredon 10-an de aŭg. je la 15-a h. por esperante parolantaj (jarkunveno).

Ĉiuj interesataj pacamikoj estas invitataj.

La estraro.



—Kion vi deziras?

— Forrazu la barbon kaj metu ĝin sur mian kapon!

### Till kongresserna

i Helsinki och Tallin ämnar E.T.K. ordna en rundresa under tiden 11—19 aŭg. Tillskriv Esperanta Turista Komisiono, Heleneborgsgat. 6, Stockholm.

### De svenska kongressdeltagarna

ombedjas till kongressen medtaga »Sveda Kantareto» i och för användning under kongressen. Inlär redan i förväg de mest allmänna sångerna!

### Kiu volas helpi

18-jaran senlaboran samideanon ricevi laboron kiel lernanto en bakejo aŭ alian laboron?

Respondo al:

SVEN SAMELIUS

Adreso: Ljugarn.

## In- och Utländsk Litteratur

### Esperantoavdelning

Nya Aktiebolaget Biblioteksbokhandeln  
Biblioteksgatan 12, Stockholm

# GÖSTA BERLING

La ĉefverko de Selma Lagerlöf

Esperantigis *Stellan Engholm*.

Ilustrita de *Einar Nerman*.

552 paĝoj. Luksa papero.

Prezo: broŝurita sv. kr. 6:—, tole bindita 7:50.

*Kiu legos verkojn de Selma Lagerlöf, devas unue legi Gösta Berling.  
Ĝi estas ŝlosilo de multaj el ŝiaj postaj verkoj.*

Förlagsföreningen Esperanto u. p. a.

Box 698, Stockholm 1.

*La Espero*

*La Tagiĝo*

Niaj plej ŝatataj kantoj en Esperanto

SUR GRAMOFONA DISKO ●

Solvoĉa kanto de la fama operetkantisto  
Gösta Kjellertz kun akompano de orkestro.

KOMPRENEBLE ĉiu esperantisto volas  
havi tiujn du kantojn sur gramofona disko.

Prezo nur sved. kr. 3:50. ●

---

Förlagsföreningen Esperanto u. p. a.  
Box 698 — Stockholm 1.

### Pagi oni povas nur:

*Pago de la kotizo okazas plej facile al la konto de la pola poŝtsparkaso sub la nomo Poczta Kasa Oszczednosci Warszawa laŭ jenaj n-roj en jenaj landoj:*

*Aŭstrio: Wien ..... No 79.500  
Belgujo: Bruxelles ..... No 244.200  
Ĉeĥoslovakio: Praha ..... No 89.600  
Danujo: Kjöbenhavn ..... No 14.972  
Francujo: Paris ..... No 600.12  
Nederlando: s' Gravenhage.. No 145.510  
Jugoslavujo: Beograd ..... No 65.049  
Latvujo: Riga ..... No 4.030  
Svislando: Bern ..... No III.6.500  
Svedujo: Stockholm ..... No 4.312  
Italujo: Roma ..... No 1/10110  
Sur ĉiuj enpagiloj devas esti jena teksto  
Adm.Literatura Mondo Krakow Nr.403.148*

*En aliaj landoj oni pagu:*

*Aŭstralio: L. E. Thomson, Esperanto ĉe Commonwealth Guvernement Savings Bank, Account Nro 496.567.  
Estonujo: Hilda Dresen, Tallinn, Poŝtk.6  
Hungarujo: Poŝtĉekkonto de Bleier Vilmos nro 25168.  
Polujo: Administracia Literatura Mondo Krakow nro 403148.  
Rumanujo: Rumana Esperanto-Instituto Cluj str. Bravilor 15.  
Japanujo: Japana Esperanto-Instituto, Tokio, Hongoo- Motomaĉi I. kaj Tokio-Do, Esperanto Fako, Tokio, Kudan, Koojimaĉi.*

*El ĉiuj aliaj landoj oni sendu poŝtmandatojn al Poczta Kasa Oszczednosci, Krakow, kio Adm. Literatura Mondo nr 403148, Polujo. — Ni akceptas ankaŭ intern. respondkup. poŝtajn en la valoro de 0.30 sv. fr. po unu. — Aliĝojn kaj pagojn cetere akceptas la reprezentantoj de Literatura Mondo kaj plejparte de la esperantistaj librovendistoj.*

**300** BILDOJN KAJ **1100** TITOLVORTOJN

en la montrata densega komposto prezentas al vi la

**UNUA VOLUMO**

de

# Enciklopedio de Esperanto

sur 272 teksto- kaj 112 bildopaĝoj grandformataj.

La dua volumo ampleksos proksimume 540 paĝojn.

Prezo 30:— frankoj svisaj broŝurita kaj 34:— frankoj svisaj bindita. Aldonu 10 proc. por sendkostoj.

*LA PREZO ESTAS PAGEBLA EN DU EGALAJ PARTOJ.*

Tuj post pago de la unua duono ni ekspedas la unuan volumon.

El landoj, tie ĉi ne menciataj: per bankĉekoj, Postal Orders, aŭ poŝtmandatoj al


*P. K. O. Krakow, Polujo, Adm. Literatura Mondo, Nro 403.148*

aŭ per internaciaj poŝtaj respondkuponoj. Unu kuponon ni akceptas en la valoro de 0.30 sv. fr.

Eldonis Literatura Mondo kaj Asocio de Esperantistaj Libro-Amikoj Budapest, IX, Mester ucca 53. V. 5, Hungarujo

**Mendantoj de tri ekzempleroj ricevas unu senpagan**

Novaliĝantoj al Asocio de Esperantistaj Libro-Amikoj rajtas ricevi ambaŭ volumojn por 14:— sv. fr.





# Internaciaj someraj Esperanto kursoj en Stockholm

23. Julio—2. Aŭgusto 1934.

La Prepara Komitato de la 26-a Universala Kongreso kaj la Sveda Esperanto-Instituto decidis komisi

## **d-ron F. Szilágyi L. K. (Budapest)**

kies speciala instrumetodo (iniciantoj: F. Szilágyi kaj Tibor Czitrom), la t. n. lumbildmetodo vekis pro siaj moderneco kaj avantaĝoj specialan atenton, por organizi

## **du 10-tagajn kursojn**

antaŭ la Kongreso (ĉiutage po 2 horoj).

*La unua kurso estos komenca kurso*, sed ĝi bonege povos servi ankaŭ por tiuj, kiuj *finis nur mallongan kurson*, kaj donos multe da okazoj por paroli (kun kaj sen lumbildoj), *la dua kurso* estos aranĝita por **progresantoj**, (instrukcia kurso por instruantoj), kaj el ties materialo ni mencias la parolekzercojn kaj metodinstruadon kun lumbildoj, la historian kaj literaturan parton, organizajn pritraktadojn ktp. Kunlaborantoj: T. Czitrom, (Budapest), E. Dahl (Uddevalla) kaj H. Seppik (Tallin).

*Kurskotizo: Svedaj kronoj 10:—* (aŭ egalvaloro), post la 10-a de julio 12 sv. kr. Sendu al: Poŝtêka konto 2012.

Malmultekostaj loĝejoj, manĝado.

Ekskursoj, amuzoj.

Petu informojn.

**Someraj Esperanto-kursoj  
Stockholm, Box 698.**